

# esperanto sub ————— LA SUDA KRUCO

ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIJO

januaro-februaro 2008 • numero 91 volumo 16 - numero 1



Fotita dum la Jarkunsido de AEA, decembro 2007

ISSN 1038-9380

esperanto sub

# LA SUDA KRUCO

ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIJO

N<sup>o</sup> 91 • Vol 16.1 • Januaro-februaro 2008

**Redaktoro:** Donald Broadribb

## *Eldonado:*

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per komputilo iMac. La programo uzita estas Mellel. La ĉeftiparo estas Charis SIL.

## *Abonoj kaj membreco:*

*Membreco en AEA* (inkl. *ESK*-on) A\$40 (A\$25 por pensiuloj kaj studentoj). Pagu al la sekretario: <sekretario@esperanto.org.au>

*Simpla abono al ESK* sen membreco kostas A\$50. Pagu al Libroservo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio: <libroservo@esperanto.org.au>

*Esperanto sub La Suda Kruco* estas aŭtomate sendata al ĉiuj ordinaraj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur p. 31.

## *Esperanto sub la Suda Kruco*

P.O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937

<esk@esperanto.org.au>

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

Enhavo © 2008, AEA & NZEA kaj la individuaj verkintoj.

## En ĉi tiu numero

Raporto de la prezidanto.....	3
Recenzo: <i>Dek tagoj de kapitano Postnikov</i> [db].....	5
La Brisbana Jarkunsido de AEA 2007 [Kam Lee] .....	6
Raporto pri la Ĝenerala Jarkunveno de la Aŭstralio Esperanto-Asocio..	8
Podkastoĵ .....	9
Fotoj de la Torquay High Tide Festival.....	10
Raportoj de Franciska Toubale:	
Vizito al Vjetnamo .....	11
SAT-kongreso en Parizo .....	11
La pluezeka renkonto.....	13
40 [Margaret Chaldecott] .....	14
Interrete:	
Perreta supera kurso de Esperanto .....	14
Radiotono de 3ZZZ .....	15
Adreso de la nova forumo.....	15
Turistoj povas viziti Strasburgon esperante.....	15
Vizito al la domo de Mary Mills en Oranĝo [Kam Lee] .....	16
Ju pli ŝanĝiĝas, des pli estas same [Henry Broadbent].....	17
La jaro de la hundo [Andrew Soos] .....	17
Doktoriĝo pri Esperanto (en Nederlando).....	18
Konu viajn kungesamideanojn:	
Libby Mortimer.....	19
Arturo Mortimer .....	20
Koresponda servo de AEA [raporto de Hazel Green] .....	21
El la Regionoj: Lingva kaj kultura festivalo de Toowoomba .....	22
An Editorial [Donald Broadribb] ..	23
Auditor's Report .....	28

## Limdato por

la marto-aprila numero de *ESK*:  
5a de februaro 2008

# Raporto de la prezidanto prezentita al la Ĝenerala Jarkunveno en decembro 2007 de Igor Couto

Karaj Geamikoj,

En la komenco de la jaro 2006, ne longe post nia tiujara Ĝenerala Jarkunveno, intervjuis min loka filio de la radio ABC en sudokcidenta Viktorio. La intervjuo daŭris proksimume 15 minutojn. Surprize, anstataŭ fari la kutimajn, ordinarajn demandojn pri “kio estas Esperanto”, la ĵurnalisto faris inteligentajn, pensigajn kaj interesajn demandojn, kiujn mi ĝuis respondi. Eble rezulte de tiu intervjuo, dum la sekvaj tagoj, la retejo de AEA ricevis multajn vizitantojn el Viktorio. Mi memoras, ke mi pensis, “ho, bona aŭguro por la nova jaro!”

Bona aŭguro ĝi ja estis. Dum la sekvaj monatoj, nia nova Estraro vigle, amike kaj harmonie kunlaboris por solvi niajn administrajn problemojn, por plibonigi niajn servojn, kaj por plani la estontecon de niaj agadoj. Kvankam la taskoj fendaj estis ofte frustraj, kompleksaj kaj temporabaj, tamen kunlabori en la Estraro ĉi jare estis por mi ja granda ĝuo! Vidante niajn samideanojn subtenantajn, instigantajn kaj helpantajn sin reciproke estis por mi profunde pozitiva sperto, kiu plenigis min per espero por la estonteco de Esperanto, kaj de nia esperanta komunumo en Aŭstralio.

Ŝajnis al mi, ke la reenergiiga etoso de la Estraro eble iomete infektis la komisiitojn kaj volontulojn kiuj

kunlaboris kun ni. Vi baldaŭ aŭdos, ekzemple, pri la mirinda renovigo de niaj korespondaj kursoj fare de Hazel Green, kaj pri nia kunlaboro kun Stano Marček en la eldonado de la angla versio de lia populara lernolibro. Vi ankaŭ aŭdos pri la translokigo de nia biblioteko al Melburno, kaj pri la penoj de nia bonkora komisiito Barrie Cledsmith renovigi la intereson de niaj membroj en ties historiaj trezoroj, kaj eble ricevi ian agnoskon kaj financon subtenon de nia registaro.

Kun vera entuziasmo mi raportas al vi, ke nia nova Ĉefekzamenisto, la eminenta Trevor Steele, diligente laboras por ĝisdatigi niajn oficialajn ekzamenojn, krei reton de oficialaj ekzamenistoj tra la lando, kaj ankaŭ esploras la uzon de la naskiĝanta internacia ekzamen-sistemo de UEA-ILEI.

Mi ankaŭ ĝojas raporti, ke la lerta komisiito por la Libroservo, Anthony Gaskell, sukcese enkondukis novajn internajn labor-protokolojn por la administrado de nia libroservo. Danke al tiuj pli modernaj kaj efikaj labormetodoj, la Libroservo superis la financon krizon de la pasinta jaro, kaj eĉ jam denove atingas modestan profiton. Helpate de diversaj volontuloj — Tim Wade-Ferrell, Miranda Lutz, Ian Wylles, Kevin Warburton, Edith Mejia, Dianne Lukes, inter ali-

## 4 | esperanto sub la suda kruco

aj — la Libroservo nun povas garantii sian ekziston, kaj la daŭran provizon de tiu grava servo al niaj membroj.

Miraklaj ŝanĝoj montriĝis ankaŭ en la socia vivo de nia movado. Novaj societaj grupoj aperis en Viktorio — MEKK (Melbourne Esperanto Coffee Club) kaj SKEKK (St Kilda Esperanto Coffee Club), kaj raportoj de aktivaj, entuziasmaj kaj regulaj klubaj renkontiĝoj alvenis de Kvinlando, Tasmanio kaj Nova Sud-Kimrio. Menciinde estas ankaŭ, ke ni havas 1 plian dumvivan membron: Frank Stephan — kiu kvankam loĝante nuntempe en Singapuro, tamen evidente sentas sin parton de nia familio.

La gejunuloj meze de ni ankaŭ pliaktiviĝis. Estis granda plezuro por la Estraro ricevi petojn pri modestaj subvencioj por 2 entuziasmaj junuloj, kies daŭran studon de Esperanto iliaj lokaj Esperanto-kluboĵ volis instigi — 1 de Tasmanio, alia de Kvinlando. AEA ankaŭ helpis la senlime labor-emajn Jonathan Moylan kaj Miranda Lutz iri al — respektive — la IJK kaj UK. Tiuj 2 brilaj gejunuloj oficiale reprezentis nian Asocion, kaj diskonigis niajn lokajn servojn kaj eventojn en tiuj gravaj internaciaj renkontiĝoj.

Mi nepre devas mencii ankaŭ la valoran laboron de kelkaj esperantistoj kiuj estas eĉ pli junaj. La adelajdaj studantoj de Gordon Coleman verkis por ni bonegan tekston por konigi Esperanton al infanoj (samaĝaj kiel ili). La korvarmiga kontribuo de la infanoj estos uzita kiel bazo por unu el niaj novaj oficialaj flugfolioj, kiujn ni espereble presigos kaj komencos disdoni venontan jaron.

Fakte, multe da taskoj faritaj ĉi jare donos fruktojn nur aŭ venontan jaron, aŭ almenaŭ en la baldaŭa estonteco. Ekzemple: post kelkaj tagoj, eblos elŭlti la novan oficialan podkaston de AEA. Podkasto estas speco de radio-programo, elŭtebla kaj aŭskultebla per Interreto. Tiu nova komunikilo de AEA nomiĝas “Tuj!”, estas produktata de Jonathan Moylan, kaj ĝiaj monataj epizodoj estos disponeblaj ĉe la adreso: <http://tuj.esperanto.org.au>.

Kompreneble, ne nur la gejunuloj kontribuis per grandaj ideoj kaj laboroj. Konsiderinte la saĝajn konsilojn de Max Wearing, la Estraro de AEA decidis akcepti sugeston por okazigi nian Somerkursaron en la sama loko, dum 5 jaroj — de 2009 ĝis 2013. La elektita urbo estas Sidnejo, kaj la Sidnejanoj jam komencis starigi lokan komitaton, kaj esplori taŭĝajn kunvenejojn. La Somerkursaroj de Sidnejo celos ĉefe diskonigi Esperanton en la ĝenerala komunumo, produkti novajn esperantistojn, kaj venigi internaciajn esperantistajn vizitantojn al nia lando.

La Estraro ankaŭ intencas organizi ĉiujare tute apartan nacian eventon, la Nacian Kongreson. La plano estas, ke ĝi okazu ĉiujare en nova urbo. La Nacia Kongreso siavice celos la interkonatiĝon kaj societumadon de nia ekzistanta esperantistaro, kaj la subtenadon de nia loka Esperanto-kulturo. Ĝiaj eventoj devus inkluzivi la konkursojn de muziko kaj teatro, kaj ankaŭ la Ĝeneralajn Jarkunvenojn de AEA.

Tamen tiuj 2 eventoj eble ne estos la solaj oportunoj, kiujn la ĝenerala aŭstralia komunumo havos estontece

por lerni kaj ĝui Esperanton. Responde al helpopeto por solvi la nuntemp-an krizon pri instruado de fremdaj lingvoj en Aŭstralio, Penny Vos estras gravegan projekton, kiu celas montri kiel enkonduki Esperanton en la bazlernejajn kursarojn tra la lando. Diversaj elstaraj esperantistoj helpas Penny-n en tiu giganta projekto, kaj mi petas al ĉiuj eltrovi pli kaj helpi, per vizito al la retejo:

<http://learn.esperanto.org.au>.

Estas ankoraŭ multaj aliaj raportindaj laboroj, kaj interesaj, naskiĝantaj projektoj en AEA, tamen sendube la ĉefa tasko, kiu multe okupas la Estraron dum la pasintaj monatoj, kaj al kiu kontribuis la plej granda nombro da samideanoj, estis la verkado de nia nova Statuto. Tiun komplikan taskon profesie plenumis nia

speciale nomumita Komitato — Miranda Lutz, Steve Pitney, Tim Wade-Ferrell kaj Gordon Coleman. La Komitato, gvidate de nia advokato Graham Wheeler, kunlaboris kun la Estraro kaj la membraro, por produkti dokumenton kiu spegulas la senton kaj volon de nia komunumo, kaj samtempe donas al ni stabilan juran bazon, sur kiu ni povas memfide plani nian estontecon,

Mi sentas, ke ni nun spertas grandan momenton de ŝango, de progreso, kaj en nia asocio, kaj en nia movado, kaj por ni ĉiuj mi fieras. “Antaŭen AEA, kaj antaŭen Esperanto!”

Estis granda honoro kaj plezuro helpi AEAn ĝis nun dum tiu grava tempo, kaj mi dankas al la tuta membraro pro tiu oportuno. □



## • Recenzas via redaktoro

**Mikaelo Bronŝtejn:** *Dek tagoj de kapitano Postnikov.* Eld. Tiĥin en Rusio, 2004. 332p.; perglue broŝurita.

Takso: 🍷🍷🍷

En la jaro 1910 komenciĝis la provo organizi tutruslandan esperantistan asocion. Ĉi tiu historia romano rekonstruas por ni tiujn epokon kaj provon. La libro havas alman karakteron: intermiksita estas tondaĵoj el periodaĵoj, historiaj notoj, rakonto. Pro tio, la legado ne estas vere glata.

Ĉefa fadeno en la romano estas la spertoj de Kapitano Postnikov, kiu strebas organizi tutlandan asocio, sed kiun kontraŭas senĉesa interkonflikto de la Esperanto-grupoj en Peterburgo kaj Moskvo. En Peterburgo Postnikov opiniiĝas heroo; en Mos-

kvo, lin oni rigardas kiel perfidulon. Ankaŭ lin spionas la rusa registaro, kiu emas opinii Esperanton fremda komploto pereigi la registemon de la Caro. Fine, lin kondamnas kaj enkarcerigas la registaro kiel politikan perfidulon. Ĉu prave, ĉu malprave? Tion ni ne scias. Unu el la ĉefprojektoj de Postnikov estas fondi Universalan Ligon, unuiĝon de ĉiuj nacioj — do ja politika ago.

Mikaeolo Bronŝtejn pretendas ke la romano baziĝas sur historiaj eventoj, kvankam ne ĉiuj rolantoj kaj dokumentoj en la romano estas historie aŭtentikaj. Lia maniero prezenti la historion estas iomete konfuza, laŭ mia opinio.

La glubindo estas malfortika; kelkaj folioj elfalis dum mia legado. □

## La Brisbana Jarkunsido de AEA 2007 de Kam Lee

okazis la 6an kaj 7an de Oktobro 2007. Proksimume 30 partoprenantoj ĉeestis, veninte el Kvinlando, Nov-sudkimrujo kaj Viktorio. Sabate okazis la oficiala parto de la kongreso kaj estis sukcesa afero. La nova estraro estis elektita. Kelkaj proponoj estis akceptitaj. Vespere okazis la vespermanĝo en la Irlanda Klubo.

### Fotitaj kongresaj eventoj



Hazel Green: Raporto pri la koresponda kurso. [Fotis Kam Lee]



Dianne Lukes: Raporto pri Esperanto en Indonezio. [Fotis Kam Lee]

Poste: Laŭ voĉdonado, AEA subtenis donon de \$5,000 al Oceana Komisiono, kiu prizorgos la donon de la mono al Hazairin en Indonezio.



Oficiala Diskuto dum la Epoko de la Nova Estraro. De maldekstre al dekstre: Miranda Lutz (Sekretario), Igor (Prezidanto), John Abood (Dua vicprezidanto), Jenny Bishop (Vickasisto). Neĉeestantaj: Jonathon Moylan (Unua vicprezidanto), kaj Stephen Pitney (Kasisto). [Fotis Kam Lee]



Vespermanĝo ĉe Irlanda Klubo #1. [Fotis Kam Lee]

Multaj esperantistoj vespermanĝis kaj festis ĉe la Irlanda Klubo. Unue la grupo intencis vespermanĝi ĉe Sizzlers, sed ĝi estis fermita pro redekociado. Okazis la dumkrizplano, kiu estis festi ĉe la Irlanda Klubo!

Inkluzivita en la menuo estas pasteĉo




de Guinness (Guinness Pie), kiu estas speco de pasteĉo havanta specialan paston sur sia supro. Antaŭe mi neniam manĝis ĝin, kaj laŭ mi ĝi estis sufiĉe bongusta.



Vespermanĝo ĉe Irlanda Klubo #2. [Fotis Kam Lee]

Irlanda folkmuziko estis vigle ludata de muzikistoj. Certe estis oportuno por ĝoje manĝi, trinki kaj drinki!



Tom kaj Tri Rakontoj. [Fotis Kam Lee]

Unu rakonto temas pri virino, kiu konstruis turon faritan el teleroj. Je la fino, la turo disfalis. La aŭdantaro entuziasme aŭskultis.

2007 estis la centjara datreveno de la komenco de organizita movado por Esperanto en Aŭstralio.



Tosto dum la festo. [Fotis Kam Lee]



Tagmez-manĝo: Sidante laŭ la longega manĝotablo (aŭ ebla linea tableto!?) [Fotis Kam Lee]

Post la Dimanĉa AEA-kunsido, okazis tagmez-manĝo. Je la malproksima finaĵo de la manĝotablo estas manpremo inter la bonkonataj esperantistoj Alan Bishop el Viktorio kaj Alan Grant el Kvinslando.

[Dum la Jarkunveno oni oficiale akceptis la novan statuton de AEA, kaj la jure necesan transiron de AEA al statuso de neporprofita kompanio laŭ la aktuala nacia korporacia regularo. — [img alt="Creative Commons BY-NC-SA license icon"]]

**aŭstralia esperanto-asocio**  
australian esperanto association



## **Raporto pri la Ĝenerala Jarkunveno de la Aŭstralia Esperanto-Asocio**

Sabato 6 Oktobro 2007

U3A, Etaĝo 4, 150 Edward Strato,  
Brisbano

La Ĝenerala Jarkunveno de AEA estis gastigita de la mirindaj Esperantistoj de Brisbano kaj okazis dum kelkaj horoj inkluzive paŭzon por tagmanĝo. Dudek kvar membroj de AEA ĉeestis la kunvenon. Raportoj prezentitaj kaj akceptitaj de la membroj (ofte kun demandoj kaj diskuto) estis: raporto de la prezidanto (Igor Couto), raporto de la sekretario (Miranda Lutz), raporto de la kasisto (Steve Pitney prezentita de Jenny Bishop — vice kasisto), korespondaj kursoj (Hazel Green), *Esperanto sub la Suda Kruco* (Donald Broadribb — laŭtleĝita de Miranda), nacia biblioteko (Barrie Cledsmith — prezentita de Miranda), teksestro (Igor), the Primary Esperanto Project (Penny Vos — laŭtleĝita de Tim Wade-Ferrell), libroservo (Igor) kaj la Oceania Komisiono (Dianne Lukes).

Ĉar nur unu nomumo estis ricevita por ĉiu estrara ofico, ili estis elektitaj nekontraŭite. Ili estis: prezidanto — Igor Couto, vicprezidanto 1 — Jonathan Moylan, vicprezidanto 2 — John Abood, sekretario — Mir-

## **Report of the Annual General Meeting of the Australian Esperanto Association**

Saturday 6 October 2007

U3A, Level 4, 150 Edward Street,  
Brisbane

The AGM of AEA was hosted by the wonderful Esperantists of Brisbane and happened over several hours including a break for lunch. Twenty four members of AEA were present for the meeting. Reports were presented and accepted by the members (often with questions and discussion): president's report (Igor Couto), secretary's report (Miranda Lutz), treasurer's report (Steve Pitney presented by Jenny Bishop - vice treasurer), correspondence courses (Hazel Green), *Esperanto sub la Suda Kruco* (Donald Broadribb — read by Miranda), national library (Barrie Cledsmith — presented by Miranda), webmaster (Igor), the Primary Esperanto Project (Penny Vos — read by Tim Wade-Ferrell), libroservo (Igor) and Oceania Commission (Dianne Lukes).

As only one nomination had been received for each estraro position, they were elected unopposed. They were: president — Igor Couto, vice president 1 — Jonathan Moylan, vice president 2 — John Abood, secretary



anda Lutz, vicsekretario — Gordon Coleman, kasisto — Steve Pitney, vickasisto — Jenny Bishop.

La rezulto de la perpoŝta voĉdono pri la nova statuto estis anoncita. Entute 89 balotiloj estis inkluzivitaj, 79 estis por la propono, 10 kontraŭ kaj unu sindetenis. Ĉi tio signifas ke la nova statuto estos uzata kiam la ŝanĝo de korporaciigo de asocio al kompanio limigita per garantio okazos.

La buĝeto estis akceptita per la sugestoj de la kasisto kaj la membroj kiuj ĉeestis. Kelkaj estontecaj aferoj estis diskutitaj inkluzive 2008 estas la internacia jaro de lingvoj kaj 2011 estas grava jaro por AEA ĉar estos la centjariĝo. La provizora dato por la venonta jarkunveno estas 4-5 Oktobro 2008 kaj volontuloj por helpi kun ĉi tiu evento kiel nacia kongreso estas invititaj kontakti la estraron. Plena protokolo de la kunveno estos havebla. Bonvole kontrolu la retejon de AEA aŭ kontaktu la sekretariojn se vi volas kopion. □

— Miranda Lutz, vice secretary — Gordon Coleman, treasurer — Steve Pitney, vice treasurer — Jenny Bishop.

The result of the postal vote about the new constitution was announced. A total of 89 votes were counted with 78 votes for the motion, 10 against and one abstention. This means that the new constitution of the AEA will become effective when the change in incorporation from association to company limited by guarantee occurs. The budget was set in accordance with the recommendations of the treasurer and the members present. Several future issues were discussed including 2008 being the international year of languages and that 2011 is a significant year for AEA being its centenary. The provisional date for the next AGM was set for 4-5 October 2008 and volunteers to help with this event as a national congress are invited to contact the estraro. Full minutes of the meeting will be available. Please check the AEA website or contact the secretary if you would like a copy. □

## Podkasto

Jam pluraj radio-elsendoj aŭskultebblas kiel podkasto. Jen listeto:  
<http://www.zervic.com/chitienun> – Ĉi Tie Nun  
<http://esperan.to/podkasto/> – esPodkasto  
<http://www.radioverda.com> – Radio Verda  
<http://www.republika.pl/viavento/aktuale/sonmaterialoj.htm> – Varsovia Vento  
<http://www.rogerborges.com> – Ro-

ger Borges  
<http://www.radio-esperanto.com> – Radio-Esperanto  
<http://87.242.26.81:8000/listen.pl> – Radio Jászberény  
<http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml> - Pola radio  
[www.radiovaticana.org/esp/index.asp](http://www.radiovaticana.org/esp/index.asp) - Vatikana radio  
<http://esperanto.cri.cn> – Ĉina radio  
 [Laŭ Esperanto de UEA, novembro 2007]

## Fotoj de la Torquay High Tide Festival 1a de decembro 2007



Miranda, Andrew, Carol kaj Elrae



Elrae, Ian, Miranda, Richard, Mina, Andrew kaj John

## Vizito al Vjetnamo de Franciska Toubale

Survoje al Eŭropo, kiel kutime, mi elektis halti en Azio, ĉar mi ne kapablas elteni pli ol dudekhoran sidadon en aviadilo. Do mi pasigis kelkajn tagojn en Ho Chi Minh urbo. Longe atendis min en la flughaveno, pro tio ke pluraj aviadiloj alvenis samtempe, malnovaj amikinoj, Kieu kaj Nga, kun nova esperantistino, Kim.

Malgraŭ la pluvo kaj mia sufiĉe peza valizo, ni iris al la centro de la urbo per motorciklo. Tiel mi estis tuj enmiksitaj en la jam spertitan bruon de Ho Chi Minh stratoj, la konstantan hupadon de aŭtomobiloj, kiuj fariĝas pli kaj pli multnombraj, la amason de motorcikloj, kiuj mirakle sukcese interkruciĝas je ĉiu krucovojo.

Mi ĉiam entuziasme forlasas tiun ĥaoson por ĝui pli trankvilan etoson en Vung Tau, urbo apud la maro, kie eblas naĝi en varmeta maro eĉ sub pluvo. Alia aloĝaĵo de Vung Tau estas unu el ties loĝantoj: Boi. Ĉiam estas granda plezuro renkonti lin kaj paroli pri io ajn senlime. Sed li ĉiam estas tre okupita. Ĉi foje li estis preparanta la Internacian Junularan Kongreson, kiu devis okazi tri semajnojn poste en Hanojo.

Nia ŝoforo iom plilongigis la reirvojon al Ho Chi Minh urbo tiel ke ni

povu bani nin en la varma akvo de termo-fonto kaj promeni, eĉ sub tormenta pluvo, en la apuda parko. Tio estas la plej bona maniero forigi laccon de vojaĝanto.

### Ĝoja renkonto en Vung Tau

La pluvo ne estas tiom ĝena en Vjetnamo, ĉar la vetero estas tamen varma. Plie, junio/julio estas la sezono de fruktoj kiel liĉioj kaj multaj aliaj kies gusto venas al mia lango, sed kies nomon mi ne konas.



La edzino de Boi, Boi, Kim kaj Kieu

Tiu mallonga restado en Ho Chi Minh urbo tamen permesis bonan interŝanĝon: miaj ĉiĉeronoj nepre intense praktikis Esperanton, dum mi akiris novajn fortojn por plu vojaĝi. □

.....

## SAT-kongreso en Parizo de Franciska Toubale

Ĉijare la SAT-kongreso okazis de la 21a ĝis la 28a de julio en Parizo, aŭ

pli ekzakte, en la suda apudurbo Antony. →

La ĉeestantoj manĝis kaj tranoktis en la prestiĝa altlernejo École Centrale, kontraŭ la parko Sceaux kaj kunvenis en universitata loĝejo Jean Zay, laŭ la nomo de franca maldekstrulo, kiu dum la 1930aj jaroj multe agis por demokratigo de edukado en Francujo.

Nur ĉirkaŭ 150 esperantistoj venis, parte pro tio ke alia granda kongreso, tiu de la fervojistoj, okazis ankaŭ en Parizo kelkajn monatojn pli frue.



La librovendo-ĉambro (bildo 1)

La programo enhavis bonan ekvilibron inter la kunsidoj, la debatoj, la ekskursoj kaj la distraĵoj. Sub la resuma nomo “Socia forumo” okazis debatoj pri enmigrado; malsato; la estonto de semoj do sekve de la homaro; malarmado; personoj en handikapigaj situacioj; la monda forumo de Najrobio; la socipolitika situacio en Tanzanio (pro la ĉeesto de esperantisto el Tanzanio, Mramba Simba); kaj kompreneble pri klasbatalo.

La kultura programo proponis altvaloran muzikon: juna operkantisto Joan Ribalta, akompanata per gitaro de Lino Markov kantis verkojn de la renesanca periodo ĝis nun, kiuj havas universalan kaj sennaciecan karakter-

on.

Profesia pianisto, Olivier Herbay, interpretis per gitaro verkojn de Brower, Bach, Barrios, Villa-Lobos, Rodrigo kaj Albeniz.

Fabrice Morandau, aŭ, mallonge, Famo, uzis siajn voĉon kaj akordionon por humuroplene kaj tre energie prezenti la vidpunkton de blindulo pri nia mondo

SAT-kongreso estas la ĝusta loko por grupo kies nomo estas “Ĵomo kaj la liberecanoj”, Do kompreneble Ĵomo kun kantistino kaj muzikistoj regalis nin per longa koncerto de energia muziko. En tiu ege gaja etoso estus malfacile malhelpi sin danci.



La librovendo-ĉambro (bildo 2)

Mi mem prezentis eltiraĵojn el la verko de Verda Majo, kiel enkondukon al debato pri la psikaj sekvoj de korp-al-korpa batalo en milito.

La ekskursoj ebligis malkovri Parizon, aparte la spurojn de la Komunumo de 1870.

Pro tio ke mi estis studento en Parizo, mi prefere promenis en la arbaro Fontainebleau kaj en la valo de Chevreuse, kie la familio Coubertin daŭre proponas al la devkompanianoj (tio estas: anoj de laborista kunfrataro fondita en la mezepoko) kom-

plementan instruadon kaj kie troviĝas restaĵoj de la kastelo La Madeleine kaj de la abatejo Port-Royal, kie loĝis la disĉiploj de Jansen en la 18a jarcento. Ili rekomendis propran pensadon. Louis XIV ne povis akcepti tiun sendependecon kaj persekutis ilin.

Ankaŭ pro la fakto, ke la kongre-

so okazis en Parizo, la kongresanoj povis profiti de mirinda libroservo, tiu de SAT-amikaro, la Landa Esperanto-Asocio por la franceparolantoj kaj de same mirinda muzikservo, tiu de Vinilkosmo.

Tiu kongreso certe sekvis la celon de la asocio: klerigi siajn membrojn. □

## La Pluezeka Renkonto de Franciska Toubale

La trian semajnon de aŭgusto jam de pli ol dek jaroj okazas en Pluezek, urbeto apud la maro, en Bretonujo, Francujo, famkonata Esperanto-renkontiĝo.

La organizantoj ne volas havi pli ol 150 ĉeestantojn por ke la etoso restu amikeca, sed nun ĉiam venas iom pli da entuziasmuloj el diversaj eŭropaj landoj kaj ĉijare eĉ el Brazilo kaj Tanzanio.



Richard Magnenat, Fabienne Berthou-Meyroux, Aline Coarer, Genevieve David, Denis Le Bras, Paul Quarre

En la mateno eblas elekti inter ses kursoj por plenkreskuloj laŭ la lingvonivelo kaj la intereso. Ekzistas aparta kurso por la infanoj. Ili okazas

en la baza lernejo de la urbeto. Ĉi jare instruis anglo, rusoj, polo, francoj kaj mi, aŭstraliano.

En la posttagmezo post vizito al diversaj vidindaĵoj de la regiono, la ĉeestantoj povas aŭ kanti; aŭ teatrumi; aŭ lerni per Esperanto aliajn lingvojn, kiel la araban aŭ la rusan; aŭ komputi.

En la vespero okazas prelegoj kaj distraĵoj.

La manĝoj estas komunaj en la festohalo de la urbeto, kio ebligas bone interkonatiĝi. Laŭvole iu ajn povas helpi purigi la teleraron aŭ la halon.

Tiu semajno estas bone konata eĉ de neesperantistoj, ne nur pro la grandaj afiŝoj, sed ankaŭ pro tio ke plurfoje la lokanoj kaj feriantoj estas invitataj por kunkanti maristajn kantojn, kundanci bretonajn dancojn aŭ aŭskulti prelegojn.

La lokanoj ankaŭ kontribuas provizante ĉambrojn, ĉar ne troviĝas hotelo en la urbeto, nur tendumejo. Tiel ankaŭ ili povas ĝui la amikecan etoson kaj simpatias al Esperanto, eĉ se ili decidis ke ili ne povas aŭ ne vo-

las lerni la lingvon.

La malfermita menso de la organizantoj, kiuj unuflanke akceptas multe da kunlaborantoj kaj aliflanke renkontigas la loĝantojn de la urbeto,

kiuj nun fieras pri la evento, kaj la esperantistojn, kaŭzas la grandan sukceson de tiu neforgesebla semajno. □

## 40

### de Margaret Chaldecott

Kvardek estas interesa numero, kun diversaj signifoj.

Pro altruismaj kialoj, personoj fistas dum kvardek horoj,

Dum kvardek tagoj Jesuo fastis kiam li estis tentata de la diablo (Mat.4:2).

Dum kvardek jaroj la Izraelidoj vagis de Egiptujo serĉante la promesitan landon.

Oni povis doni kvardek batojn kiel punon al kulpulo (Readmono 25:3).

Por ŝirmi aliajn kontraŭ ebla malsano, vojaĝantoj ofte devis esti izolitaj dum kvardek tagoj.

En la hispana lingvo, la vorto

estas CUARANTENA. Kiam mi loĝis en Kubo, miaj geamikoj diris ke “you are in quarantine now” ĉar la busbiletoj kostis 40 pesojn.

Por mi, kvardek havas diversajn signifojn. Mi eklernis Esperanton antaŭ pli ol kvardek jaroj. Je la aĝo de 40, mi edziniĝis. Mi loĝas en mia nuna domo jam de kvardek jaroj.

Kaj, en la pensoj de kelkaj, vivo komenciĝas je kvardek jaroj.

Intertempe, mi sentis min en Kvaranteno. Sed nun mi sentas min for de la aĉa kvarentena periodo. Estas vivo preter Esperanto.

Mi vivas!

□



## • Interrete

• **Perreta supera kurso de Esperanto:** Dum la lastaj tagoj estis anoncita supera kurso de Esperanto en la malnova, fama Jagelona Universitato de Krakovo, lernado kiun povas akcepti ankaŭ esperantistoj el aliaj landoj. Fine de la kurso oni ricevas saman “Certyfikat”, kiel tiun, kiun la universitato liveras pri aliaj lingvoj.

La ebleco estas unika, ĉar nun ne estas planoj pri estonta simila, malferma por ĉiuj supera kurso de Esperanto en tiu universitato.

Pro interesiĝo de gesamideanoj el malproksimaj landoj (i.a. el Brazilo) oni decidis, ke por eksterlandanoj la kurso povas esti nur perreta kaj ke *ne necesos veni al Pollando* por studi. Temas pri regula kaj serioza perreta studado kun parte voĉa perreta trejniĝado kaj ekzameno-prezento de parto de la akiritaj scioj en onia propra lando!

Oni trovos pli da informoj en la portalo:

<http://www.esperanto-reto.org>

Studenta Scienca E-Rondo en Jagelona Universitato, aŭ rekte en:

<http://docs.google.com/>

Doc?id=dhp3sf5p\_163fp2j3g&pli=1

Kore salutas vin Maria Majerczak

<mmajerczak@gmail.com> ☐

- **Radiotono:** La teamo de la Esperanto-programo en radio 3ZZZ (92.3 FM) kore dankas la multajn esperantistojn, kiuj montris sian subtenon per mondonaco okaze de la radiotono, evento okazanta ĉiun jaron en oktobro. Ni esperu, ke kelkaj el vi gajnos la allogajn premiojn.

La programo en Esperanto vivos plian jaron danke al vi, ĉu vi loĝas en Aŭstralio, ĉu eksterlande. La teamanoj havos la plezuron daŭre provizi al vi agrablajn horojn da aŭskultado aŭ rekte lundon de la 1a posttagmeze ĝis la 2a, aŭ rete je la adresoj:

[www.3ZZZ.com.au](http://www.3ZZZ.com.au), aŭ [www.melburno.org.au](http://www.melburno.org.au)

3ZZZ Esperanto teamo

Karlo Egger, Lez Farkas, Svetislav Kanacki, Henry Broadbent, Franciska Toubale.

PO Box 1106

Collingwood Vic 3066

- **Estis komposteraro** en la novembro-decembra numero de *ESK*. La retadreso de la nova forumo estas <http://australiaforumo.freeforums.org/>

- **Turistoj povas viziti Strasburgon esperante:** 500 000 vojaĝantoj eniras la boatojn de la Strasburga Sendependa Haveno ĉiujare. Pro tio, kaj celante utiligi Esperanton, ni proponis al la Haveno traduki la promenadon tra la urbocentro kaj la eŭropa kvartalo al Esperanto.

La estro de la haveno akceptis la

proponon, kaj transdonis la francan tekston al ni. Post adaptiĝo al la internacia publiko kaj traduko, helpite de Catherine Roŭ kaj Ginette Martin, la strasburgaj klubanoj surbendigis ĝin. Ni fine kontrolis longecon de ĉiu sekvenco, kaj dank' al la ĉina versio kiu estas ofte longa, ni havis sufiĉe da tempo por paroli klare.

Nuntempe, Esperanto aŭskulteblas ĉe tegmentaj boatoj “Nuée bleue”, “Belle Strasbourgeoise”, “Rouget de l’Isle” kaj “Petite France”. Venontjare, la lasta tegmenta boato “Gustave Doré”, kaj la sentegmentaj boatoj ricevos ĝin post adaptiĝo de sia sonsistemo.

Esperanto nun fariĝas la deka lingvo aŭskultebla dum la vizito. Antaŭ ĉiu ekiro, la ŝipestro anoncas ĉiujn dek lingvojn per laŭtparolilo. Ĉiuj ĉeestantoj aŭdos la frazon “Por aŭskulti la ĉiĉeronadon per la internacia lingvo Esperanto, elektu numeron 10”.

Ĉar eble vi ne havos tempon enŝipiĝi, aŭ vi ne ŝatas tiun rimedon por malkovri la urbon, vi povas elŝuti la sondosierojn kaj aŭskulti ilin per via mp3-ilo. Vizitu:

<http://www.esperanto-strasbourg.net>  
aŭ <http://benecyril.free.fr>.

Klubanoj aldonos poste aliajn dosierojn, kiuj rilatos al la katedralo kaj placoj Kleber kaj Gutemberg.

Nia plano estas nun organizi inaŭguron de tiu nova uzebleco de Esperanto, venigante gravulojn kiel Eŭropaj Parlamentanoj. Ni planas filmi inaŭguran paroladon, aldoni bildojn de la urbo, kaj disvastigi ilin senpage al ĉiuj televidkanaloj en Eŭropo kiuj volos raporti pri la evento.

[laŭ *Ret-info*] ☐



# VIZITO AL LA DOMO DE MARY MILLS EN ORANĜO

de Kam Lee.

Veturante al Brisbano por la Esperanto-kongreso 2007, Andrew kaj mi vizitis Mary Mills-on en Orange, orienta enlanda NSK. Banjo Patterson naskiĝis proksimume en la loko kaj li estas fama pro siaj poeziaĵoj “La Viro el Neĝa Rivero” kaj “Clancy de la Superriverbordo” (Clancy of the Overflow.) La urbo nomiĝis rilate al “La Reĝo de Orange”, kiu poste fariĝis Reĝo de Nederlando. Multaj fruktoj kiaj pomoj kaj ĉerizoj, sed ne multaj oranĝoj kultiviĝas en la loko.

Estas interese ke Orange altas 868 metrojn super la marnivelo kaj averaĝas 5 gradojn malpli ol Dubbo, kiu havas alton de nur 264 metroj. La distanco inter la du urboj estas nur 120 km. Tioma ŝanĝo estas granda en tia vasta enlanda regiono.



Mt Canobolas. Grandega geologia arbarkovrita amaso de rokoj en la regiono Orange. Tre multaj jaroj forpasis post la epoko de bruegaj erupcioj kaj fanditaj fluantaj lafriveretoj.

Antaŭe ni vizitis la proksiman mortan vulkanon, Mt Canobolas,

1396 metrojn super marnivelo. La vidaĵo de la ĉirkaŭa tero je la supro estas bela.



Starantaj apud la antaŭo de la domo de Mary kaj John Mills. Maldekstre al dekstre: Andrew Lutz, John Mills kaj Mary Mills.

Vespere, ni ĉeestis en la domo de Mary Mills kaj ni vespermanĝis kun Mary Mills kaj ŝia edzo John. La bak-aĵoj estis sendube nutroriĉaj kaj bon-gustaj. Poste Andrew montris librojn, kiujn li aĉetis dum la UK-kongreso en Jokohamo. Mi montris fotoĵojn de la somerkursaro 2007 en Hobarto.

Laŭ Mary, la efekto de monda varmiĝado okazas en Orange. Multajn jarojn antaŭe neĝo sur la tero kelkfoje okazis dum la vintro, sed nun tia fenomeno estas tre malofta okazaĵo. La gastigado de Mary estis tre varma. Andrew kaj mi eĉ povis dormi en apartaj litĉambroj. Mary havas tre feliĉan personecon kaj ŝi diris, ke ŝi bonkore invitas aliajn esperantistojn viziti ŝin. Ŝi pripensas iri al la universala kongreso en Roterda-

mo, Nederlando dum 2008. Se vi vizitus ŝin, eble vi pliinformiĝus pri la progreso de ĉi tiu projekto! Ŝia inter-

retadreso estas:

<Marygmills@optusnet.com.au>



## Ju pli ŝanĝiĝas, des pli estas same de Henry Broadbent


Dum mia vivo mi spertis signifan ŝanĝon al la angla lingvo. Mi memoras kiam mi uzis la vorton “snorkle” por indiki tuberon el objekto. La ĉefo diris ke la vorto ne ekzistas, sed mi mem ne inventis ĝin.

(Tiutempe oni ankaŭ uzis la vorton por la tubero kiun oni nun uzas kiam oni “snorklas” en la maro.)

Baldaŭ poste personoj kiuj verkas komercajn leterojn komencis uzi la vorton “finalized”. “Ŝoko kaj hororo!” venis el la seriozoj gramatikistoj. “‘Final’ estas adjektivo ne verbo.” Tamen la signifo de la frazo en kiu la vorto estis uzata ne estis duboplena kaj la longeco de la letero per tiu uzo

iĝis pli malgranda.

Post tiu tempo la anglaj verkistoj nun uzas multajn adjektivojn kiel verbon kaj la angla lingvo estas pli riĉa per tio. Kiu el vi nun memoras pri tiu polemiko en la kvindekaj?

Sendube la angla parolanto povas lerni multajn aliajn plibonigojn, el la pensoj de L.L. Zamemhof kiu evoluigis sistemon fari pli logikan lingvon antaŭ 120 jaroj. Dum la pasinteco gramatikistoj insistis uzi la latinan gramatikon por “korekti” la anglan lingvon. Eble en venontaj tempoj ili penos “korekti” la anglan lingvon per esperanta gramatiko. 

## La jaro de la hundo

de Andrew Soos kun helpo de Hazel Green

Laŭ la ĉinoj, 2006 estis la Jaro de la Hundo. Oni diras ke homoj, kiuj naskiĝis en tiu jaro estos fidindaj kaj honestaj.

Sed por mi, 2004 estis vere la jaro de la hundo, ĉar en tiu jaro aĉetis mi mian unuan montrohundon. Mi estis nur juna, la unuan fojon kiam mi vidis montrohundon.

En la apuda strato loĝis homo kiu havis du belajn grandajn hundojn, de la speco Weimaraner. Kun lernejo-sako en mia mano, mi fiksigardis la bestojn kun miro. Mi admiris la fleks-

ebajn, potencajn muskolojn de la hundoj. Sed kial la grandaj oreloj? Ho — mi pensis — mi devos havi tian beston!

Kvankam muskola, la montrohundoj ne havas pezecan formon. Ili estas tre ludemaj, kaj povas detrui ĝardenon, kiam ili enuas.



Mi havas du hundojn: hungaran kaj germanan. La du specoj havas similan historion en la socio. La montrhundoj en Germanujo kaj Hungarujo apartenis al la aristokratoj. Ili pasigis la plejparton de la tempo kun siaj mastroj, kaj ne estas feliĉaj kiam solaj.

La montrhundo estis bredita por ĉasado, sed la besto ne mortigu la predon. La bona montrhundo nur atendas kaj montras la predon. Pafi la predon estas la laboro de la mastro.

Kiam oni vidas la montron, tio estas tre interesa. La hundo haltas kaj levas la antaŭan piedon. Eĉ la vo-

sto staras, kaj estas parto de la montrhundo. La hundo montras per la tuta korpo de la vosto ĝis kapo kaj piedo. La montrhundo estas grava, ĉar la montrhundo ne estas vere ĉasisto, sed parto de la ĉasistgrupo.

Mi opinias, ke pro tio la hundo estas pli afabla kaj iĝas bona familimembro. Mi estas bonŝanca, ĉar mi loĝas apud kampoj, kie la hundoj povus kuri 80 kilometrojn en tago.

Tio ne estas ideala por homo, kiu amas la trankvilan vivon. Sed por iu, kiu amas promeni kun la kompanio de noblaj bestoj la montrhundoj estas specialaj. □

## 🐾 • Negranda informo atentinda Doktoriĝo pri Esperanto

Doktoriĝis en la Universitato de Amsterdamo la iama estrarano de “Esperanto Nederland” kaj de Internacia Esperanto-Instituto (IEI), Wim Jansen, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto en tiu sama universitato.

Por atingi tiun ĉi rezulton Jansen faris esploron pri vortordaj aspektoj troveblaj en la nuntempa, ĵurnalismeca lingvaĵo kaj publikigis pri tio disertacion, kiun li sukcese defendis la 2-an de oktobro. La doktorigaj akompanantoj estis la profesoroj Hengeveld (por la ĝenerallingvistika parto) kaj Van Oostendorp (por la ĝenerallingvistika kaj por la esperantologia aspektoj). En la doktora komisiono sidis i.a. prof. Haase de la Universitato de Bamberg, Germanio. La ceremonion ĉeestis pluraj konataj espe-

rantistoj el Nederlando kaj ekstere.


La 283-paĝa disertacio estas verkita en la nederlanda lingvo kaj proponas resumojn en la angla, esperanta kaj germana lingvoj. Temas pri la dua disertacio pri Esperanton rilatanta temo defendita en nederlanda universitato ene de unu jaro (post Marcus Sikosek, doktoriĝinta en novembro 2006 post esploro pri la historio de UEA), sed pri la unua disertacio post 1947(!), kiu rekte koncernas la lingvon mem. Estas antaŭvideble, ke la Universitato de Amsterdamo baldaŭ nomumos Jansen-on plenrajta speciala profesoro en la katedro, kiun li de 2004 okupas en la nomo de IEI.

[Laŭ *Ret-info*] □



# • Konu viajn kungesamideanojn

## Libby Mortimer



